

---

# 宗教と科学

## *Religio kaj Scienco*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

---

数学者の岡潔 (1901-1978) は「宗教なき科学は非人間的であり、科学なき宗教は信ずるに値しない。」と言ったそうです。

物理学者の A. アインシュタイン (1879-1955)、歴史学者の A.J. トインビー (1889-1975) も岡潔と同じ趣旨のことを言っています。

これら 3 人の、近代を代表する科学者が、宗教なき科学を断罪しているのは興味深いことです。科学に通達すればするほど、科学の不完全さを自覚するのでしょうか。

近代日本では、宗教といえば何かしら非科学的・非合理的の一言で切り捨てられてきました。科学が発達すれば宗教は不必要になる、という考えがありました。しかし、科学が万能であるなどとは幻想に過ぎないことが明らかになりつつある現代、私たちは生きる拠り所、何が真実かを見分ける確かな視点を見失っているのではないのでしょうか。拝金主義、生命の軽視、モラルハザード、深い喪失感、自殺の増加、これらすべては、宗教を失った社会の病ともいえると思います。

宗教の代替物としてスポットライトを浴びているのが「ニューエイジサイエンス」ですが、これは疑似科学のひとつです。疑似科学に騙されている現代人は案外多いようです。例をあげま

Oka Kijoŝi (matematikisto, 1901-1978) iam diris, "Scienco sen religio estas nehumana; religio sen scienco ne indas je kredo."

Ankaŭ A. Einstein (fizikisto, 1879-1955) kaj A. J. Toynbee (historiisto, 1889-1975) diras la samon kiel Oka.

Tiuj ĉi tri sciencistoj, reprezentantoj de la moderna scienco, konviktas sciencon sen religio; tio estas interesa. Eble ju pli oni spertiĝas pri scienco, des pli oni konscias pri neperfekto de scienco.

En la moderna Japanio oni forĵetadis religion dirante, ke ĝi estas kontraŭscienca kaj kontraŭracia. Oni imagis, ke religio jam ne necesos, kiam scienco sufiĉe progresos. Nun en la postmoderna epoko tamen jam estas evidente, ke scienco ne estas ĉiopova, kaj pro tio ni perdis la bazon por nia vivo kaj la certan vidpunkton por distingi veron el malveraĵoj. Adorado de mono, malestimo de vivo, morala danĝero, profunda perdosento, multiĝo de suicido, ĉio ĉi estas malsano de la socio, kiu perdis religion.

"Novaĝa scienco" estas prilumata kiel substituito de religio. Sed ĝi estas pseŭdoscienco, de kiu eksternsupoze multaj nuntempuloj estas trompataj.

すと、血液型性格分類、気功、風水、アロマテラピー、マイナスイオン、活性水素水、超心理学、バイオリズム、波動パワー、精神分析、一連の健康食品などがあります。これらは、一見科学的に思えるのですが、反証可能性 (falsifiability) を有しない構造だったり、データの集め方が恣意的であったりと、科学的手法の条件を満たしていません。例えば、「マイナスイオンは健康に良い」、このことの可能性を否定するものではありませんが、現時点においては仮説の域を出ません。にもかかわらず、マスコミや企業によってイメージだけが先行し、それに一般の人々が踊らされている、というのが実態です。

いっぽう、科学なき宗教の跋扈も見過ごしにはできません。これは科学を装うのではなく、最初から科学を拒否する宗教で、オカルトや原理主義がこれにあたります。

科学的真理とは、だれもが承認せざるをえないもので、それに反するのは迷信でしかありません。かつて釈尊は「いくら念じても水に浮かぶ木を沈めることはできない、いくら念じても水に沈む石を浮かべることはできない」とおっしゃいました。釈尊の合理を尊ぶ精神の表れです。

これに対して、仏教者の言う宗教的真理とは、人間の実存に関わることで、それによって生きる喜びが見いだされることをいいます。

安直に科学と宗教をまぜてはいけません。そして、片方だけによりかかるのではなく、両方を尊重するべきです。

Ekzemple, klasifiko de temperamento laŭ sangotipo, *qigong*, *fengshui*, aroma terapio, negativa jono, akvo de aktivigita hidrogeno, parapsikologio, bioritmo, forto de ondomovo, psikoanalizo, serio da porsanaj manĝaĵoj, k.t.p. Kvankam tiuj ĉi ŝajnas sciencaj, ili ne kontentigas sciencajn metodojn, ne posedante falsigeblecon aŭ kolektante arbitre datumojn. Oni ofte diras, ke negativa jono estas bona por sano. Mi ne neas la eblecon. Sed tio ĉi ankoraŭ estas hipotezo. Malgraŭ tio fare de amaskomunikiloj kaj entreprenoj favora imago estas disvastigataj, kaj popolo estas manipulata de ili.

Dume ni devas ne preteratenti la svarmon de religio sen scienco. Ĝi ne vestiĝas per la kostumo de scienco, sed de la komenco rifuzas sciencon. Temas pri okultismo kaj fundamentalismo.

Scienca vero estas tio, kion ĉiuj devas aprobi. Kontraŭi ĝin estas superstiĉo. Ŝakjamunio iam diris, "Ligno sur akvo ne sinkas, kiom ajn oni preĝas por tio; ŝtono sinkanta en akvon ne leviĝas, kiom ajn oni preĝas por tio." Jen la anekdoto montras lian racionalismon.

Religia vero, kiam budhano temas pri ĝi, rilatas homan ekzistadon. La homo eltrovas la ĝojon vivi, kiun religia vero donas al li.

Ni devas ne facilanime miksi religion kun scienco, kaj devas estimi ambaŭ, ne dependante nur unu el ili.